

ARKONES informilo

ARtaj KONfrontoj en ESperanto, Poznań 24 - 26 IX 2010

Ĝeneralaj informoj

ARKONES estas sendependa arta kaj kultura forumo organizata fare de membroj de E-SENCO Kultura-Socia Societo al Ludoviko Zamenhof kaj sub aŭspicoj de UEA kaj TEJO.

Utilaj informoj:

Kontaktotelefonoj:

Paweł Janowczyk 602 28 32 42

Tobiasz Kaźmierski 509 40 03 17

Taksioj: Se vi vokas radiotaksikompanion RMI: 61 821 92 19 kaj uzas kodon AK-98 por la nomo Paweł Janowczyk vi veturos malmultekoste.

Biletoj: „duonhora” (3,60 zł) trafikbiletan, validan por tramoj kaj busoj. La biletoj aĉeteblas en kioskoj. Vojaĝemuloj en la fervoja stacidomo povas aĉeti diurnan (13,20 zł) aŭ semajnan (32,00 zł) biletojn, kiuj konsiderinde malaltigas kostojn.

Gravaj adresoj:

Arkonesejo

Aleo Niepodległości 8a

Studenta Domo „Jowita”

ul. Zwierzyniecka 7

(ĉe la Rondo Kaponiera)

Forirante el viaj ĉambroj bv. ĉiam lasi ŝlosilojn ĉe la hotela/studentdoma acptejo!!!

Manĝeblecoj:

En la Arkonesejo funkcios bufedo (trinkaĵoj kaj rapidaj manĝaĵoj)

Pri enhavo de materialoj, kiujn la organizantoj ricevis por distribui al la arkonesanoj dum la aranĝo respondecas la aŭtoroj mem.

Programo

Vendredo (2010-09-24)

18.00 Nora Caragea – legas fragmentojn el sia plej nova libro “Pacakontoj” (Biblioteko)

18.05 Alina Orlicka – aŭtoro renkontiĝo pri libro „La Rozo” (Spegulejo)

19.00 Sebastian Cyprych - “Scribus-programo por paĝokompostado” (Biblioteko)

19.05 Barbara Pietrzak – Informa, virtuala socio kaj E-parolantoj (Spegulejo)

20.00 Oficiala malfermo. Koncerto: Gitar-flutaj impresoj de gefratoj Śliwak (Spegulejo)

21.00 Manuel Rovere – koncerto (Spegulejo)

22.00 SoloTronik – koncerto (Spegulejo)

23.00 Dancvespero

Sabato (2010-09-25)

- 9.00 Aleksander Korĵenkov – Mark Fabianoviĉ Zamenhof, instruisto en ŝtataj lernejoj (Biblioteko)
- 9.05 Sebastian Cyprych - Strukturita Teksto – kiel facile skribi tekstojn en diversaj formatojn konante nur unu (Bombardier)
- 10.00 Lidia Ligeza – Ĝojoj kaj tristoj de la esperanta tradukanto (Biblioteko)
- 10.05 Sebastian Cyprych - Strukturita Teksto – kiel krei bildprezentadojn (Bombardier)
- 11.00 Andrzej Grzębowski - Internacia E-turismo en 2010 (Biblioteko)
- 11.05 Pola Esperanto-Asocio – Fermita estrarkunsido
- 12.00 Kapriol! - Danckurso (Spegulejo)
- 13.00 Komuna foto (antaŭ la enirejo)
- 13.10 Stanislav Rynduch – Prelego kaj diskuto pri la lingva situacio en EU kaj pri la lingva politiko (Biblioteko)
- 14.00 Ryszard Rokicki – Plurformismo – diskuto pri la sintaksa genro en E-o (Biblioteko)
- 14.05 István Ertl – Revuo de revuoj, sen tabuoj (Spegulejo)
- 15.00 Marian Zdankowski – Esperanto-kvizo (Biblioteko)
- 15.05 Roman Dobrzyński – Sinjoro Tadeo parolas Esperante – pri esperantigo de la filmo de A. Wajda (Spegulejo)
- 16.00 Tea Radovanović kaj Marija Jerkovic – Tradukprojekto de Kroata Esperanto Ligo kaj de Eŭropa Unio (Biblioteko)
- 16.05 Pola Esperanto-Asocio – Publika diskuto (gvidas Zbigniew Galor) (Spegulejo)
- 17.00 Ulrich Lins – Parolado pri “La arto labori kune” (Festlibro por Humphrey Tonkin) (Spegulejo)
- 18.00 Prezentiĝo de Esperanto-eldonejoj, gazetoj kaj radioj (Biblioteko)
- 18.05 Johannes Mueller – koncerto (Spegulejo)
- 19.00 Katalin Kovats – Prezento de la nova retejo www.eduakdo.net kaj la KER- ekzamenoj (Biblioteko)
- 19.05 Jarlo Martelmonto kun sia nova scenejverko “UM JE UME, UM EN JEE” ! (Spegulejo)
- 19.45 Mielvespero: Enmanigo de diplomoj KER-ekzamenoj, Rezultoj de la Plebiscito 2010, Skeĉoj „La oraj pantalonoj en arbustoj”, Georgo Handzlik, finiĝos per recitalo de Joachim Kołpanowicz (Spegulejo)
- 22.30 Kapriol! - koncerto
- Poste Dancvespero

Dimanĉo (2010-09-26)

- 8.00 Akbar Fekriabkenar – prelego pri iranaj ĵurnaloj (Biblioteko)
- 9.00 Halina Gorecka – Vojaĝo al Tilsit. Literatura portreto de Hermann Sudermann (Biblioteko)
- 9.05 Stanislav Rynduch – Esperanto rare, kurioze (Spegulejo)
- 10.00 Guy Johnston kaj Przemysław Wierzbowski – Eŭropa Volontula Servo *EVS* - kiel Esperante volontuli en Eŭropo
- 10.05 Halina Komar – kun invito filmo pri Nowy Sącz (kie okazos Tutpollanda Esperanto-Kongreso) (Spegulejo)
- 11.00 Paweł Fischer-Kotowski ‘Fiskot’ – prezentas anglalingvan gvidlibron kun resumo en Esperanto *QueerWarsaw* (Biblioteko)
- 11.05 Zbigniew Galor – UEA en konscio de esperantistoj – kelkaj rimarkoj baze de elektitaj unuaj datumoj (sociologia SEG-esploro 2009) (Spegulejo)
- 12.00 „Sinjoro Tadeo” parolas Esperante – filmo de A. Wajda (Biblioteko)
- 12.30 Adam Chrupczak – monodramo “Nigraj makuloj” surbaze de verko de Tadeusz Różewicz, reĝisoras Lucyna Sowińska (Spegulejo)
- 14.30 Oficiala fermo kun muziko de Manuel Rovere

Spektakloj kaj koncertoj

Adam Chrupczak

Monodramo “Nigraj makuloj” surbaze de verko de Tadeusz Różewicz, reĝisoras Lucyna Sowińska.

“Nigraj makuloj” estas spektaklo, kiu rakontas la historion de Homo. La Homo, kies plej granda malamiko estas alia homo. Różewicz koncize, brute, kun ironia perforteco pentras portreton de la moderna homo. Ĉi tio estas la rakonto pri soleco kaj sopiro pendigitaj en malplena realeco.

La spektaklo ricevis la duan premion dum Tutlandaj Rekontiĝoj de Unuaktoraj Teatroj en Bydgoszcz. “Nigraj makuloj” estis prezentitaj dum 77-a Itala Kongreso de Esperanto en Lignano Sabbiadoro.

Kapriol'!

La nova grupo Kapriol'! prezentas svingan kaj varian programon kun balfolkaj danc-melodioj kaj kantoj en Esperanto, kiuj fontas el tradiciaj repertuaroj nederlandaj aŭ estas memfaritaj. Konkize dirite, ili ludas kaj malnovan muzikon per novaj muzikiloj kaj memfaritan muzikon per malnovaj muzikiloj. Ĉion ili kombinas kun bela plurvoĉa kantado kaj plurkoloraj aranĝoj. Krom tio improvizaĵo estas grava parto.

La frisa bando Kapriol'! (Nederlando) estiĝis spontane dum balfolkaj vesperoj. Antaŭe la muzikistoj jam ludis sur multaj festaj scenejoj. Marita kaj Marian ludis dum longaj jaroj en la Esperanto-grupo Kajto kaj nun ili prezentiĝas en la duopo Marianta. Ad kaj Rutger jam abunde meritis siajn spronojn en la bandoj Blue Tape Band, 60/60 (Ad), Kalis kaj Sjock (Rutger).

Balfolko signifas: festa balo kun tradiciaj dancoj, kiuj jam estas ŝatataj dum multaj jarcentoj en tuta Okcident-Eŭropo. Temas pri pardancoj kiel skotiŝo, polko, valso, mazurko kaj vicdancoj kiel bureo aŭ andro. Estas ankaŭ ronddancoj kiel cerklo kaj ĵigo ĉe kiuj la partneroj daŭre interŝanĝas. La grupo volonte montras la dancojn aŭ povas doni danckurson por dancigi la publikon. Ne necesas multe da dancekspliko, ĉar la bazo de la balfolkaj dancoj estas sufiĉe simpla.

Kapriol'! estas:

- Ad Bos - kaĥono (drumkesto) kaj aliaj perkutinstrumentoj, klavaro, kantado
- Rutger Dijkstra - basgitaro, gitaro, violono, kantado.
- Marita Kruijswijk - flutoj, ŝalmo, kantado
- Marian Nesse - akordiono, kantado

Kontakto: Marita Kruijswijk
Retadreso: marianta@xs4all.nl
Retpaĝo: www.marianta.nl

Joachim Kołpanowicz

Li estas studento de komponado kaj teorio de muziko en la Krakova Muzikakademio kaj studento de muzikologio de Jagielona Universitato. Li ankaŭ lernas pianludon ĉe prof. Grażyna Pagowska kaj gitarludon ĉe prof. Adam Zalas. La artisto koncertis enlande kaj eksterlande, ankaŭ kelkfoje dum tradiciaj Esperantaj Tagoj de Krakovo.

Por ĉi-ARKONESa koncerto la aŭtoro kolektis verkojn de hispanaj komponistoj el diversaj epokoj. Esprimeblecoj de klasika gitaro plej konvenas al la karaktero de hispana muziko. En la koncerto troviĝas interalie verkoj de: E. Granados, I. Albeniz, G. Sanz, F. Tarrega.

Kontakto: Joachim Kołpanowicz
Retadreso: joachim.kolpanowicz@gmail.com

Jarlo Martelmonto

La scenejverko "UM JE UME, UM EN JEE"

Johannes Mueller

La oraj pantalonj en arbustoj

Kabareda grupo "La oraj pantalonj en arbustoj" estis verkita aŭtune 2009 j. de belaj, junaj kaj kompreneble modestaj esperantistoj kiuj tute ne havas senton de humuro ;-). Ideo de verkado de kabaredo verŝajne naskiĝis iomete frue sed neni ŝias kiam. Ĝis nun la grupo prezentis sin dum kunveno de PEJ kaj en varsoviaj kulturdomoj.

Repertuaro de kabaredo konsistas el propraj skeĉoj kaj el tradukitaj skeĉoj de pola fama kabaredo "Potem" ("La Poste"). Dum Arkones la grupo prezentos ĉiujn skeĉojn eĉ kun kelkajn novajn nenie prezentitan.

La grupo konsistas el diversaj homoj, kiuj aliĝis al grupo pro diversaj kialoj: ekde plibonigado de mondo, tra popularigado de esperanto, ĝis simpla ĝojo kaj evoluigado sin mem. Sed unuigas ilin amo por arto kaj por frenezaĵoj (ĝenerale por frenezaĵoj) kaj se ili estas grupo de bonaj amikoj. Kaj kontraŭstarigo sin kontraŭ tremao (-;



Por scivoluloj kiuj volas scii kion signifas nomon de kabaredo ni volas anonci ke ni mem tute ne scias sed historio estas tiel: Ni longe diskutis pri nomo kaj finfine plaĉis al ni du nomoj “la oraj pantalonoj” kaj “en arbustoj” kaj longe ni ne povas decidi al iu de tiuj nomoj, do fine ni elektis ambaŭ.

Alina Orlicka

Sur la monda libromarkato aperis interesa libreto, kiu estas kvazaŭ daŭrigo kaj bela, feliĉa fino de aventuroj de Eta Princo, heroo de la rakonto de A. de Saint Exupèry.

“La Rozo” de Alina Orlicka – estas penetrema kaj tre subtila esploro de virineco – oni havas la impreson, ke konsiderita estas ĉi tie ĉiu vorto, ĉiu penso... Ĝi estas rakonto pri la artoj elekti kaj decidi, sed antaŭ ĉio – ĝi estas bela rakonto pri vekigo kaj maturigo de sentimentoj...

“La Rozo” de Alina Orlicka ricevis tre favorajn editajn recenzojn kaj aperis en kelkaj dulinvaj versioj, en kiuj pri literaturaj tradukoj el la pola originalo sin ŝarĝis: Maciej Pikuliński, David Nieto-Rasiński, Andrzej Kraszewski kaj la Aŭtorino mem.

La Aŭtorino proponis al la legantoj originalan, forte pripensitan editan formon de la rakonto, ornamitan per bela grafiko kaj riĉigitan per ciferecigo sur disko CD kun bunta aktora interpreto en pollingva originala versio, substrekitan per muzikaj motivoj de la Rozo kaj Princo kaj Vento kaj kiel nomis la Aŭtorino montritan sur kovrilo eldonciklon de sia verkado – “La Rozo”- instruas, amuzas kaj kortuŝas kaj invitas al legado!



Manùel Rovere

Tradukanto kaj de pluraj poemoj kaj muziktekstoj Esperanten, kaj aŭtoro de propraj kantoj, prezentas propran prelego-koncerton celloinstruan.

Kontakto: Manùel Rovere
Retadreso: emanrovere@libero.it



Solotronik

Saluton geamikoj.

Kiel vi fartas?

Vi aŭdos elektronike, per drumo kaj basoj, elektroniko, dancmuziko, ĝangala muziko plus flamenko. Mi intencos eksplodi per ritmoj kaj sonoj nian venontan Arkones!!!! Plus tian universon da sonoj vi vidos, la stelaron da lumoj, eterajn formojn kaj ĉu la orgaj nizantoj sukcesas klopodi. Ni eĉ vidos videoj de la prezentado per eĉ 4 kaj 5 superpozicioj da bildoj en diversaj flankoj de la muro.

La aliajn partojn mi gardas ĉar temas pri surprizoj. La Esperanto aŭdebla temos pri tradukoj de poemoj de Federico Garcia Lorca el galega lingvo al Esperanto, kun aliaj tekstoj el Kalocsay, Lapenna kaj Auld. Vi aŭdos ankaŭ aliajn kanzonojn el 80-aj jaroj el mia malnova muzikgrupo de tiu epoko, kiu multe da sukceso havis en ne espa etoso.

Mi transdonis al espa mondo kelkajn kanzonojn, kanojn kiel novaj skemoj, novaj funkciadoj aŭ jubileo en la kancelario, mitikaj kanzonoj el la pop etoso de Hispanio sed nun en Eo.

Mi aldonas al la repertuaro kanzonojn de la unuaj epokoj, poemojn de Liven Dek, G. Kamachô, Federico Garcia Lorca, Lapenna, Auld, Kalocsay.

*Bone, nenion plu, mi esperas ke vi kunlabore dancu, multe krii kun mi, kaj kiam vi aŭdos **Ar ko nes, Ar ko nes** vi devas krei kun mi: **Ar ko nes** kaj ni ĉiuj diros **Ar ko nes!!!!***

Ĉu ni aŭ mi sukcesos, ni metos la rezulton en YouTube kaj en ne espa, tre grava muzika paĝo, espereble, nia Eo furiozos kaj sukcesos tra nia tuta galaksio

Solotronike via.

Ĝis.

Kontakto: Eduardo Vargas Gutierrez
Retadreso: solotronik@yahoo.es

Milena kaj Tomasz Śliwak

Milena - talenta flutistino – komforte sintentas en klasiko kaj en ĵazimprovizado, kunludis kun mondfama flutistino Niocolle Mitchell kaj ŝia ensemblo, diplomitino pri Muzika Ĵurnalistiko kaj aktuale pri Radia-Televida Ĵurnalistiko de la Vroclava Universitato.

Kontakto: Milena Śliwak
Retpaĝo: <http://www.recenzje.witryna.info>

Tomasz - eminenta juna pola gitaristo-virtuozo, laŭreato de la Grand Prix-premio en Internacia Gitar-konkurso, posedanta titolon: Poeto de la Gitaro. Lektoro en altlernejo

En la programo: “La gitara-fluta impresoj” prezentas ĉarmajn, allogantajn publikon per rafineca realigo – muzikajn miniaturojn kaj proponas ankaŭ proprajn solistajn recitalojn kun plej belaj gitaraj kaj flutaj muzikverkoj.



Prelegoj

Aŭtoro: Nora Caragea
Titolo: “Pacrakontoj”
Priskribo: Legas fragmentojn el sia plej nova libro.

Aŭtoro: Tomasz Chmielnik
Titolo: La funebraj kutimoj de judoj. Kiel deĉifri surskribojn sur la tomboŝtonoj (macevoj).
Priskribo: Prelego kun prezento de lumbildoj.

Aŭtoro: Tomasz Chmielnik
Titolo: Nova disko en Esperanto – Irena Urbańska prezentas kantojn de la krakova juda bardo Mordehaj Gebirtig.

Aŭtoro: Sebastian Cyprych
Titolo: reStrukturitaTeksto - kiel rapide kaj facile krei diverstipajn tekstojn.
Priskribo: Aŭtoro priskribas la reStrukturitanTekston kiel manieron uzi krudan tekston ĉe kreado de diverstipaj tekstoj: ĝiaj eblecoj, (mal)avantaĝoj kaj uzo. Ĝi donas ankaŭ kelkajn ekzemplojn pri la preparado de la teksto kaj ĝia konvertado al aliaj formatoj.
Oni referencas ankaŭ al aliaj marklingvoj kaj komparas kun la plej konataj formatoj.

Aŭtoro: Sebastian Cyprych
Titolo: reStrukturitaTeksto - kiel rapide kaj facile krei bildoprezentadojn
Priskribo: Aŭtoro prezentas la reStrukturitanTekston kiel manieron uzi krudan tekston ĉe kreado de bildoprezentadoj.

Aŭtoro: Sebastian Cyprych
Titolo: Scribus - libera kaj senpaga programo por paĝokompostado
Priskribo: Prezento de programo *Scribus* ĉe kreado de pres-dokumentoj: ĝiaj eblecoj, (mal)avantaĝoj kaj uzo.

Aŭtoro: Roman Dobrzyński
Titolo: Sinjoro Tadeo parolas Esperante.

Priskribo: Adam Mickiewicz intencis verki bagatelan idilion kaj kreis nacian epopeon, Antoni Grabowski tradukis ĝin en Esperanton, kvankam li konsideris tion “neeblaĵo”, Andrzej Wajda kuraĝis transformi tiun ĉi “puran poezion” en kinobildojn. La tri defioj sumiĝis en la esperantigita varianto de la monumenta filmo “Sinjoro Tadeo”, prezentita dum la 94-a UK en Bjalistoko en 2009.

Roman Dobrzyński en sia prelego rakontas pri genezo kaj historia fono de “Sinjoro Tadeo”, skizas biografion de Adam Mickiewicz, liajn motivojn verki la epopeon, proceson de ĝia verkado kaj posta perceptado.

Alia temo estas tradukado de “Sinjoro Tadeo” en fremdajn lingvojn. El proksimume 80 tradukoj la granda plimulto estas farita proze. Al tiuj, kiuj konservis la originalan metrikon, apartenas la traduko de Antoni Grabowski. La preleganto prezentas plurajn detalojn de la tradukpeno de Grabowski, danke al kiu li akiris titolon: “La patro de la Esperanta poezio”.

Dobrzyński malkaŝas sekretojn, kiuj permesis al Andrzej Wajda fari “dinamikan” filmon el la poezia legaĵo, anticipi konsiderata kiel turmento por lernantoj. Ĝi allogis milionojn da spektantoj. Fine oni povas aŭskulti pri interesa procedo kongrui polajn dialogojn kun ĝiaj Esperantaj ekvivalentoj, fiksita sur ekrano kiel subtitoloj, kaj pri la peno kompletigi fragmentojn de la epopeo, kiuj mankas en la traduko de Grabowski.

Aŭtoro: István Ertl

Titolo: Revuo de revuoj, sen tabuoj

Priskribo: Senstreĉa komuna foliumado de kelkaj periodaĵoj, Esperantaj kaj ne.

Kio okazas en la mondo: en nia miniatura verda universo, kaj en la “vera” mondo?

Kio kaŝiĝas malantaŭ la linioj? Ni analizos kune iomete, ne ĉiam serioze. Ni serĉos sencojn kiujn foje eĉ la aŭtoroj ne konjektis.

Aŭtoro: Akbar Fekriabkenar

Priskribo: Prelego pri iranaj ĵurnaloj.

Aŭtoro: Paweł Fischer-Kotowski ‘Fiskot’

Priskribo: Paweł Fischer-Kotowski (FisKot) - pola esperantisto, socia aktivulo pri homaj kaj GLAT-raĵtoj, sekretario de la Komisiono de Socia Dialogo pri Egaleca Traktado en Varsovio. Esperantiĝis en 2008.

QueerWarsaw estas anglalingva gvidlibro tra la samseksema Varsovio kun esperanta resumo. Ĝi rakontas historion pri Varsovio, kiam samseksemo estis en Pollando tabuigita temo kaj gejoj renkontiĝis sekrete en kelkaj karakteristika lokoj. Poste alvenis tempo de la unuaj gej-kluboj kaj tra la malpermeso organizi GLAT-manifestacion en 2005, historio finiĝas en 2010, kiam en Varsovio okazis tuteŭropa Geja Fiero.

Aŭtoro: Zbigniew Galor

Titolo: UEA en konscio de Esperantistoj. Rimarkoj baze de unuaj datumoj de sociologia SEG-esploro 2009

Priskribo: 1. Rimarkoj, kiuj rilatas al ĝisnuna sociologia literaturo pri la esplorobjekto: imago de esperantistoj pri UEA, (baze de: Ĉu la “Diabla Cirklo”? Direkte al sociologia esploro pri UEA, en: La reto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin, 2010):

a) Dilemo de apartaneco de esploristo al la grupo, kiun li esploras;

b) Direkte al la nova paradigmo (lingvistika kaj sociologia aliro al esperanto);

c) Plej signifaj ĝisnunaj esploroj pri UEA kiel socia organizo (E. Woite – 1972; N. Rašić – 1991);

d) La “Diabla Cirklo” de E. Woite.

2. Genezo, realigado de la esploro;
 - a) Individua interesiĝo kaj ideo de Sociscienca Esperanto Grupo (SEG);
 - b) Decidoj de SEG-kunveno dum la 93a UK, Roterdamo - 25.07.2008;
 - c) UK en Bjalistoko – 2009 – paperaj enketiloj (kunlaboro de esperantistoj);
 - d) Interreta enketilo de la 28.07. ĝis fino de oktobro 2009 (programisto P. Sperling); favoraj kaj nefavoraj flankoj;
 - e) Statistika prilaboro de 375 enketiloj 42 paperaj; metodologo M. Tyszko).
3. Rimarkoj, kiuj baziĝas sur la elektitaj, unuaj datumoj de la esploro 2009; elektitaj ecoj de respondantoj:
 - a) Maniero de eklerno de esperanto, uzo de esperanto;
 - b) Membreco UEA kaj ne; partopreno de Bjalistoka kongreso;
 - c) Uzado de interreto, legado de libroj,
 - d) Familia stato, loĝado,
 - e) Eduko, ekonomia stato, ŝtataneco, nacieco, sekso, aĝo)

Gvidanto: Zbigniew Galor
Titolo: Diskuto pri Esperanto movado en Pollando.

Aŭtoro: Halina Gorecka
Titolo: Vojaĝo al Tilsit. Literatura portreto de Hermann Sudermann.
Priskribo: Hermann Sudermann estis tre populara germana verkisto kaj dramaturgo ĉe la limo de la 19a kaj 20a jarcentoj, pri kiu oni rakontis diversajn anekdotecajn historietojn. Li naskiĝis en la Orienta Prusio en Matzicken (nun en Litovio). La patra familio de menonitoj el Nederlando delonge enloĝiĝis en Elbing. Li studis en Kenigsbergo kaj Berlino, laboris kiel instruisto, ĵurnalisto, verkis rakontojn, novelojn, romanojn kaj dramojn. La unuaj spektakloj laŭ liaj dramoj alportis al li grandan sukceson kaj popularecon. La verkoj de Sudermann iĝis bazo de pli ol tridek filmoj. La vojaĝo al Tilsit estas la plej brila rakonto el la malfrua kolekto Litauischen Geschichten (Litovaj noveloj, 1917) — realisma portreto de lia hejmlando.

Aŭtoro: Andrzej Grzębowski
Titolo: Internacia E-turismo en 2010.

Aŭtoroj: Marija Jerković kaj Tea Radovanović
Titolo: Hindia infanlibro en Eŭropo kaj tri infanlibroj eŭropaj en Hindio.
Priskribo: Marija kaj Tea preparolas projekton realigitan kadre de “Programo kultura” por la jaroj 2007-2013 far Kroata Esperanto-Ligo, dum kiu estis intertradukitaj kvar infanlibroj - unu bengala:

- “La vivo de Damoruo”

kaj tri eŭropaj:

- “La ĵurnaleta de Joĉjo Tempesto”
- “Mi volis tuŝi la sunon”
- “Wakajtapu”

La projekto celis alproksimiĝon de eŭropaj landoj kaj kulturoj kun la hinda pere de libroj por infanoj.

Dum la realigo de la projekto inter kvar landoj – Hindio, Italio, Kroatio kaj Slovenio, oni laboris per Esperanto. La aŭtorinoj preparolos detalojn pri kandidatigo ĉe Eŭropa Komisiono, de kunlaboro dum la tradukado, kaj de distribuado de la libroj.

Aŭtoroj: Guy Johnston kaj Przemysław Wierzbowski
Titolo: Eŭropa Volontula Servo *EVS* - kiel Esperante volontuli en Eŭropo
Priskribo: Ĉu vi membras en Esperanto-organizo, kiu suferas je manko de laborpretuloj? Ĉu via klubo volas instrui la lingvon aŭ organizi eventon, sed neniu povas plene dediĉi sian tempon por tio? Ĉi tiu problemo oftas en Esperantujo. Ekzistas tamen solvo, kutime nekonata, sed facile atingebla - tio estas Eŭropa Volontula Servo. En ĉi programo ĉiujare centoj da gejunuloj veturas al aliaj landoj por volontuli tie dum kelkaj monatoj. Iliaj programoj estas plene pagataj de Eŭropa Unio, kaj inter tre diversaj volontulaj laboroj jam trifoje partoprenis ĝin esperantistoj. Dum la prelego vi ekscios pri spertoj kaj ideoj de la ĝisnunaj volontuloj kaj ĉiel informiĝos pri kiel/kie/kiam gastigi aŭ mem fariĝi partoprenanto de *EVS*. Vi vidos, ke la farendaj formalizaĵoj ne estas timige multaj, kaj la rezultoj - fruktodonaĵoj.

Aŭtoro: Aleksander Korĵenkov
Titolo: Mark Fabianoviĉ Zamenhof, instruisto en ŝtataj lernejoj.
Priskribo: Bedaŭrinde, dum multaj jaroj oni ripetadis nepruvitajn informojn, ĉerpitajn en la Vivo de Zamenhof de Edmond Privat, verkita antaŭ 90 jaroj, kaj en aliaj verkoj malnovaj. Ekzemple, laŭ la legendo, M. F. Zamenhof instruis geografion kaj modernajn lingvojn en mezlernejo, do en la Bjalistoka gimnazio. Sed la esplorado montris, ke li (1) neniam instruis en la Bjalistoka gimnazio, sed nur en la 2a Bjalistoka juda lernejo; kaj (2) tie li instruis ne fremdajn lingvojn kaj geografion, sed la rusan lingvon kaj aritmetikon.

Ĉi tiuj kaj kelkaj aliaj antaŭe nekonitaj faktoj pri la patro de la Iniciatoro de Esperanto estis trovitaj per esplorado en la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (Peterburgo) kaj en malnovaj gazetoj kaj konsultlibroj.

Aŭtoro: Katalin Kováts
Titolo: Ĵus antaŭ la monda premiero de la nova www.edukado.net.
Priskribo: En majo 2009 disiris al la mondo helpkrio por savi la riĉegan, sed kolapsiĝantan porinstruistan paĝaron. Necesis ĉ. 30 mil eŭroj por rekrei la plej ampleksan Esperanto-retejon, por ke ĝi povu plufunkcii kaj estu ankaŭ la plej moderna. La ĝisnuna sponsoro ESF ne povis helpi. La timo perdi ĉion tamen ne daŭris longe. Ĉirkaŭ 200 personoj de la dumilmembra komunumo, kiuj konsciis pri la graveco de la enhavo kaj la laboro, kunmetis preskaŭ la tutan bezonatan monon kaj la tasko estas sukcese plenumita.

La 1-an de oktobro leviĝos la kurteno kaj malfermiĝos la nova www.edukado.net, kiun ni sukcesis rekonstrui malgraŭ la obstakloj, kiujn la antaŭaj programistaj starigadis. Kiujn bravurojn faris Jevgenij Gaus, la nova programisto kun sia teamo? Kiel rekreiĝis la plurdek mil paĝoj? Kia estas la nova retejo? Novaj funkcioj, faciligoj kaj teknikaj solvoj. Kio ne pretas kaj por kio mankas ankoraŭ mono? Kaptu la okazon por informiĝi rekte ĉe la redaktoro ĵus antaŭ la premiero.

Aŭtoro: Lidia Ligeza
Titolo: Ĝojoj kaj tristoj de la esperanta tradukanto
Plano: La referaĵo konsistas el:

- I. Ĝeneralaj informoj pri la arto traduki laŭ esploristoj de ĉi tiu problemo
 - a) kelkaj bazaj baroj por la teksto refarita en la alia lingvo:
 1. baro de la natura lingvo
 2. baro de la literatura tradicio de du diversaj kulturoj
 3. baro de la devoj traduki en difinita tempo laŭ la difinitaj reguloj de la tradukarto
 - b) rilatoj kaj necesoj inter originalo kaj traduko:
 1. la vortoprovizo (vortaroj)

2. konstruo de la frazo (gramatiko)
 3. lingvokomuniko (bazo de interpreto)
 4. reago (kritiko)
- c) efikoj de la traduklaboro
- d) ilaro de la tradukanto, laboro rilate al enhavo kaj formo
- e) kvar principaj tipoj de transformigado:
1. redukto aŭ plikurtado
 2. inversio
 3. substituado aŭ ŝanĝado de la elementoj
 4. kompletigado
- f) bona poezia traduko kiel bildo de la epoko kaj forma paralelaĵo respektanta longecon kaj nombrojn de verso kaj strofoj kaj la saman ritman strukturon.
- La ekzemploj devenas el “Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz tradukita de Antoni Grabowski.
- II. La propraj tradukartaj spertoj
- a) embusoj de la gepatra lingvo
 - b) duboj pri esperantigado de la propraj nomoj
 - c) elektado inter diversaj eblecoj
 - d) neceso sensolenigi la oficialan lingvon
 - e) neceso apliki neologismojn.
- Laŭ tradukoj i.a. de poemoj de Stanisław Młodożeniec, Konstanty I. Gałczyński kaj Wisława Szymborska.

Aŭtoro: Ulrich Lins

Temo: La arto labori kune. Redaktaj spertoj pri la festlibro por Humphrey Tonkin .

Priskribo: Humphrey Tonkin iĝis sepdekjara komence de la pasinta jaro. Okaze de tiu datreveno UEA eldonis festlibron. Ĝin redaktis Detlev Blanke kaj mi.

Kiel kutimas ĉe festlibroj, la volumo per siaj kontribuajoj klopodas respeguli la vivon de la jubileulo. Tio ne estis facila, ĉar Tonkin havas multajn trajtojn. Li estas fakulo pri la angla literaturo kaj ĝis hodiaŭ lekcias pri tiu fako. Kiel universitata profesoro li aktivis ankaŭ ekster sia fako. Li multe laboris por la internacia interŝanĝo de universitatanoj kaj estis dum kelkaj jaroj eĉ prezidanto de sia universitato. Kaj – por esperantistoj plej okulfrappe – li energie engaĝiĝis en la Esperanto-movado, interalie, dum entute naŭ jaroj, kiel prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

La redaktoroj dekomence konsciis, ke ne eblas kompili festlibron, kiu adekvate konsiderus ĉiujn trajtojn de Tonkin. Limigon prezentis la decido inviti nur kontribuajojn esperantlingvajn. Tio dekomence ŝajnis ekskludi vastan pritrakton de temoj proksimaj al la specialisto pri Spencer kaj Shakespeare aŭ rilatantaj al universitata administrado. Kiam ni invitis kontribuojn al la festlibro, ni tamen celis kiel eble plej larĝan spektron de homoj kaj temoj. Ne eblas detaligi niajn kriteriojn, sed la homoj, kiujn ni alskribis, estas certe tre malsamaj: ili vivas en dekoj da landoj en kvar kontinentoj kaj reprezentas multajn fakojn; ili estas profesoroj aŭ laboras en neuniversitata profesio; kaj multaj paralele aktivis diversmaniere en la Esperanto-movado.

En somero 2008 ni invitis proksimume 230 homojn, kiujn ni supozis kompetentaj verki scienc-nivelan artikolon. Ni iom konsideris la kriterion, ĉu la alskribito konas Tonkin. Kelkajn, pri kiujn ni sciis, ke ili proksime kunagadis kun Tonkin, ni eksplicite invitis verki ne ion fakan, sed siajn personajn memorojn. Kian reeĥon havis nia unua invita cirkulero? Kiel ni atendis, kelkaj tute ne respondis. Aro da homoj afable respondis, ke ili tre volonte kontribuis, ĝuste pro aprezo al Tonkin, sed ke bedaŭrinde profesiaj devoj aŭ urĝaj taskoj malhelpas ilin verki ĝis la limdato, kiu oficiale estis la 31-12-2008. Fine ni havis 105 kontribuojn.

Mi ne detaligu nian redaktan laboron. Ni klopodis esti kiel eble plej liberaj rilate la limdaton. Tre malsame disvolviĝis la tasko de redaktado. Kvankam por atingi iom unuecan formon de la manuskriptoj kaj faciligi al ni la redaktan laboron ni sendis al la aŭtoroj tre detalajn instrukciojn, ni kompreneble devis multe labori, ĝis la teksto estis prespreta. Ankaŭ kompreneble, variis la grado de interveno en tekstojn. Kelkajn apenaŭ necesis prilabori – fakte, al tiu kategorio apartenas tre malmultaj. Al la plej multaj ni dediĉis iom aŭ multe da tempo, ne tiom por forigi lingvajn erarojn, sed por glatigi la stilon. Iuj, feliĉe ankaŭ tre malmultaj, bezonis fundan revizion, fojfoje eĉ preskaŭ kompletan reverkadon. Estis nur unu-du kazoj, kiam ni devis rifuzi kontribuojn.

Ne eblas resumi la tutan festlibran enhavon. La kontribuoj estas jene dividitaj: Lingvopolitiko kaj lingvoplanado, Interlingvistiko, Esperantologio, Historio, Movado kaj komunumo, Apliko kaj disvastigo, Literaturo, Strategio, Anekdotoj kaj rememoroj. Tio nur skize peras imagon pri la vasteco de temoj, ekzemple ne malkaŝante ke ene de kelkaj sekcioj estas artikoloj kaj pri Esperanto-rilata kaj pri neEsperanta temo. (Evidentiĝis fine, ke enestas ankaŭ artikolo pri Tonkin kiel tradukinto de Shakespeare.) Oni kompreneble povas depende de la propra prefero kritiki teman malekvilibron aŭ, pli ĝenerale, riproĉi al la festlibro ĝian heterogenecon. Tamen, ĉi tie temas pri io, kio estas la ĉefa trajto de praktike ĉiu festlibro.

Mi resumu la superrigardon pri la traktita libro, citante ĝian titolon. La titolo estas La arto labori kune. Ĝi unuavice rilatas al impona kvalito de la prifestata jubileulo, nome al lia kapablo inviti homojn al kunlaboro kaj sukcese kunlabori kun li. Sed mi kuraĝas aserti, ke en tiu titolo esprimiĝas ankaŭ la kolektiva omaĝ-cela fortostreĉo de pli ol cent aŭtoroj.

Aŭtoroj: Barbara Pietrzak

Titolo: Kiom la retaj ligoj ebligas kaj spronas, kiom malebligas la komunikadon inter la esperantlingvanoj.

Priskribo: Ekde la apliko de la Interreto en la esperantista komunumo la reto ŝajnis ligita nur kun kunlaboremo, reciproka riĉiĝado per informoj kaj spertoj. Multajn pozitivajn facetojn de tiu kunlabora efiko en la interreta komunikado oni gajnis dum la lastaj du jardekoj plurplatforme, i.a. en laboro de la E-Redakcio de Pola Radio.

Pli aktiva aliĝo al la diskutlistoj, publikaj forumoj klare reliefigas, ke krom tiuj pozitivaj trajtoj en la reta spaco Esperantoparolantoj kondutas simile, kiel nacilingvanoj en la sociaj forumoj, portaloj, diskutlistoj de la virtuala mondo.

Tio vekas intereson sekvi evoluon, informojn, diskutojn, publikaĵojn pri la informa, virtuala socio.

De ĉirkaŭ 20 jaroj en Eŭropo, iom pli frue en Usono kaj en Japanio ni frontas la formiĝadon de la t.n. informa socio. Anticipis tion la rezonado de teoriuloj, kiuj prognozis la socian evoluon baze de informaj teknologiaj. La aktivado de usonaj sciencistoj, alkondukis al la apero de la Interreto, kiu ĉesis servi sole al la interŝanĝo de informoj inter esplorcentroj en civilaj kaj militistaj esplorinstitucioj. Famas la premisoj de la Lisbona Strategio, ke la Eŭropa Unio en 2010 fariĝos la plej moderna mastrumado en la mondo. Do pri kio ni parolas uzante la difinon informa socio ?

La ĉiam pli vasta uzo de la reto en la vastaj sociaj rondoj kondukis samtempe al la kreiĝado de la t.n. virtuala socio, kies aktiveco – malantaŭ la dorso de politikistoj kaj kelkfoje spite ilian vokon - dank' al la informaj teknologioj, ĉefe la Interreto, estas transportata en la virtualan spacon, alivorte en la reton. Krom multaj pozitivaj trajtoj tiu virtuala socio karakteriziĝas ankaŭ per parola agresemo kaj perforto.

Kiel en tiu virtuala realo retrovas sin la E-komunumo, kiu el la latentaj socio en la daŭro de pli ol 100 jaroj alprenis trajtojn de komunumo reala vivanta dise kaj nun vaste trovas spacon en la virtuala mondo, en la Interreto? Ĉu la reta agreso kaj vorta perforto en multaj intervenoj de E-parolantoj estas io aparta? Ĉu valoras pri tio okupiĝi? Kiom tio ebligas kaj spronas, kiom malebligas kunlaboremon inter la Esperantolingvanoj ?

Do, jen klopodo listigi kelkajn esplorendajn demandojn pri la retaj forumoj, pri laboro per la retlistoj. Ĝenerale, la invito al la komuna opiniinterŝanĝo kaj divido de spertoj.

Aŭtoro: Ryszard Rokicki
Titolo: Plurformismo en Esperanto.
Priskribo: La prelego estas kontribuo al diskuto pri radikoj kaj ilia sintaksa genro.

“Radikoj ne rolas en derivado”. Laŭ tiu teorio, novaj vortoj deriviĝas ne de radikoj, sed de jam ekzistantaj vortoj.

Kiun rolon plenumas radikoj en derivado? La demando: Ĉu novajn vortojn oni kreas de radikoj aŭ de aliaj vortoj, ŝajnas esti grava nur por teoriuloj, sed ĝusta respondo povas kontribui, ke ni ekzemple alimaniere alfrontos la la problemon kiel difini kapvortojn en nova plena vortaro de Esperanto.

Por prilumi iom la problemon la aŭtoro analizos la fenomenon de plurformismo, kies esenco estas, ke ekzistas malsamaj lingvaj esprimformoj, kiuj plenumas la saman signifan funkcion. Interesos lin precipe tiuj plurformaj paroj, el inter kiuj almenaŭ unu elemento estas morfologie tuteca vorto. Ekz.:

Post longa *osta* malsano li lamas nun.
Post longa malsano *de osto* li lamas nun.

Lamulino kaptis min per *osteca* mano.
Lamulino kaptis min per *osta* mano.

Dum la *prezidenteco* de I. Lapenna okazis, ke...
Dum I. Lapenna estis *prezidanto* okazis, ke...

En la plurformaj paroj Rokicki sekvas la funkciadon de unuopaj radikoj por konstati ilian konduton kaj el tio konkludi pri ilia rolo en la vortfara sistemo de Esperanto. Tiu analizo permesos defendi la tradician teorion, ke oni kreas novajn vortojn de radikoj ne de jam ekzistantaj vortoj. Ĉe radikoj klare videbliĝos ankaŭ kategorio de sintaksa genro, al kiu ili submetiĝas. Tiu kategorio informas pri la frazfunkcio, kiun (statistike plej ofte) plenumas la vorto, kiun ĝi konsistigas kune kun la vortklasaj finaĵoj: ~o ~i ~a / ~e kaj ebligas al mi difini tri ĉefajn tipojn de radikoj, nome:

- radikoj, kiuj en eldiroj konsistigas vortojn, kies formoj sekvas la morfologian paradigmon de substantivo kaj plenumas en la frazo karakterizajn por ĝi funkciojn (ekz. tiun de subjekto, objekto, predikativo, esprimas singularon aŭ pluralon, k.s.).
- radikoj, kiuj en eldiroj konsistigas vortojn, kies formoj sekvas la morfologian paradigmon de verbo kaj plenumas en la frazo karakterizajn por ĝi funkciojn (ekz. tiun de predikato, esprimas tensojn, modojn k.s.).
- radikoj, kiuj en eldiroj konsistigas vortojn, kies formoj sekvas la morfologiajn paradigmojn de adjektivoj kaj adverboj kaj plenumas en la frazo karakterizajn por ili funkciojn.

Senfrukta estus la diskuto, se ĝi portus nenian utilon al la praktiko. Analizo entreprenata de la preleganto ebligas rigardi la vortfaran sistemon de Esperanto el alia perspektivo, eble eĉ pli profunden vidi ĝin. Unu el la utiloj estas helpi al la uzanto ĝuste kaj laŭsence uzi la lingvon. Ankaŭ apliki en ĝia priskribo la kategorion de sintaksa genro estos helpa. Ĝi ne nur kongruas kun la interna strukturo de la lingvo, sed ankaŭ trafe ĝin respegulas. El ĝi povas i.a. fonti inspiro al nova redakto de plena vortaro de Esperanto. Tiu konsultverko povus ŝanĝi sian tradician aspekton, kion montras la suba aplika ekzemplo de la klarigaj notoj de kapvorto *ekspozicio* kaj vortkapoj *ekspozici* (ekzemploj de la uzo ĉerpitaj el la Tekstaro – www.tekstaro.com).

Aŭtoro: Stanisław Rynduch
Titolo: Lingva situacio kaj politiko en EU.
Priskribo: La prelego preparita okaze de “Tago de la lingvoj” pritraktas la nunan situacion de lingvoj - same minoritataj kaj malaperantaj, kiel la oficialaj.

Ĝi montras ankaŭ la agadon de Eŭropa Unio, kaj precipe de ĝia komisiono pri plurlingveco, kaj tezas la kialojn de ĝia propono lernigi ĉiujn Eŭropunianojn pri fremdaj lingvoj.

Substrekita estas ebla solvo de la lingva konfuzo ene de Eŭropunia Komisiono per Esperanto, ĝisnunaj agoj tiurilataj, kaj ties atingoj.

La aŭtoro ankaŭ volas vekti diskuton pri lingva politiko de Esperantistoj kaj voki ilin al kuna agado.

Dum la prelego, apartan parton okupos informoj pri akcio “Esperanto 125”.

Aŭtoro: Stanisław Rynduch

Titolo: Esperanto rare, unike.

Priskribo: La aŭtoro, kiel aktiva, kaj konscia kolektanto, priskribas rolon de kolektado por E-movado - esploran, klerigan kaj informigan rolon. Prezentotaj estos trajtoj kaj devoj de pasia kolektanto, kaj agado de Klubo de Esperantokolektantoj ELF/AREK kun la bulteno “La Verda Lupeo”.

La aŭtoro, prezentos ankaŭ la unikaĵojn de sia kolekto:

- unuan volapukan poŝtmarkon (eble ununuran en la mondo!)
- Esperantan moneron - “Spesmilo” (unu el la kvar en la mondo!)
- originalajn korespondaĵojn de E-pioniroj kun subskriboj de D-ro Zamenhof.

Krome oni akiros ceterajn, profesinivelajn informojn rilate al kolektado: kion kolekti, kiel akiri, kien aliĝi ktp.

Aŭtoro: Wojciech Usakiewicz

Titolo: Esperanto en kabeeska perspektivo.

Aliaj programeroj

- tradicia Arkonesa mielvespero,
- XII-a oratora konkurso – lanĉita por gimnasti langojn de la partoprenantoj de ARKONES,
- prezentiĝo de Esperanto-eldonejoj, gazetoj kaj radioj,
- libroservo,
- Pola Esperanto-Asocio – kunsido de estraro kaj publika diskuto por difini la atingeblajn celojn de la pola E- movado,
- Katalin Kovats – enmanigo de diplomoj de KER-ekzamenoj,
- Ivo Miesen - fotoekspozicio de aktualaj kaj malaktualaj fotoj faritaj de Ivo Meisen. Parto de fotoj faritaj dum Esperantaj aranĝoj kiel: FESTO 2010, JES, kaj ASO, fotoj de Esperantaj kaj neEsperantaj koncertoj kaj vojaĝaj fotoj,
- Andrzej Sochacki – fotoservo, komuna foto de ĉiuj partoprenantoj (okazos sabate je la 17-a),
- Marian Zdankowski – Esperanto-kvizo,
- Marian Zdankowski – anonco de la rezultoj de Plebiscito 2010 en kategorioj: “Esperantisto de la Jaro”, “Loka E-aktivulo”, “Debuto de la Jaro”, “Tutaĵo”.